

**Frederiko Engelso:
Enkonduko al Karlo Markso:
Klasbataloj en Francio 1848 ĝis 1850 (1895)**

Frederiko Engelso

**Enkonduko al Karlo
Markso: Klasbataloj en
Francio 1848 ĝis 1850
(1895)**

Monda Asembleo Socia (MAS)

Frederiko Engelso: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francio
1848 ĝis 1850 (1895)
elgermanigita de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2013
ISBN 978-2-918300-89-2

Tiun ĉi libreton la tradukinto dediĉas al

Gerardo Hernández Nordelo,
Ramón Labañino Salazar,
Antonio Guerrero Rodríguez,
Fernando González Llort kaj
René González Sehwerert¹

-
- 1 *La Kvin Kubanoj* – aŭ *la Kuba Kvinopo* –, kiuj estis sin enŝovintaj en la teroristajn grupojn de Miamo, Usono, por neŭtraligi ilin. La Kvin sukcesis malhelpi cent sepdek atencojn kontraŭ Kubo per tio, ke ili ĝustatempe alarmis la instancojn en Havano. La kuba registaro informis tiam la usonajn instancojn kaj, en junio 1998, delegacio de la FBI vojaĝis al Kubo, kie ĝi ricevis kompletan dokumentaron pri la agadoj de la ekstremistoj de Miamo.

Post konatiĝi kun la informoj kaj la nerefuteblaj pruvoj pri la kontraŭleĝaj kaj danĝeraj agadoj de tiuj grupoj, la FBI, anstataŭ agi kontraŭ tiuj krimuloj, arestigis la kvin informantojn, kiuj, riske de siaj vivoj, estis barintaj tiujn teroraĵojn. Ili estis en Miamo kondamnitaj al longaj jaroj de malliberejo, ekz-e Gerardo al pli ol duoble vivlonga malliberejo.

Pri tiu justicskandalo vidu en Esperanto Salim Lamrani (komp.): *La terorismo de Usono kontraŭ Kubo; La Kuba Kvinopo*. Esperantigoj el la hispana kaj la franca lingvoj de diversaj MAS-anoj, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

Frederiko Engelso: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francio 1848 ĝis 1850 (1895)

(el: Karl Marx/Friedrich Engels – Werke. [Karl] Dietz Verlag, Berlino, volumo 22, 3. Eldono de 1972, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1963, Berlino, GDR, p. 509-527. Verkita inter la 14-a de februaro kaj la 6-a de marto 1895. Laŭ la kompostaĵoj de la eldono de 1895.)

La ĉi tie nove eldonita laboraĵo estis la unua provo de Markso klarigi pecon de samtempa historio per sia materiisma kompreno. En la „Komunista Manifesto”² la teorio estis aplikita en grandaj konturoj al la tuta nova historio, en la artikoloj de Markso kaj de mi en la „Nova Rejna Gazeto” ĝi estis konstante uzata por interpreti samtempajn politikajn okazaĵojn. Sed ĉi tie, alie, temis pri pruvado de la interna kaŭza interplektiĝo en plurjara evoluo, kritika same kiel tipa por la tuta Eŭropo, do, laŭ la intenco de la aŭtoro redukti la politikajn okazaĵojn al efikoj de lastanalize ekonomiaj kaŭzoj.

Ĉe taksado de okazaĵoj kaj de serioj da okazaĵoj el la aktuala historio oni neniam kapablos reiri ĝis la *lastaj* ekonomiaj kaŭzoj. Eĉ hodiaŭ, kiam la speciala fakgazetaro liveras tiom abundan materialon, restos eĉ en Anglio malebla sekvi la iradon de la industrio kaj de la komerco en la mondmmerkato kaj la ŝanĝojn okazantajn en la produktadmetodoj tagon post tago tiel, ke oni povus tiri ĝeneralan konkludon por ĉiu ajna momento el tiuj diverse implikitaj kaj ĉiam kreskantaj faktoroj, faktoroj, el kiuj la plej gravaj krome plej ofte dum longa tempo efikas nevideble, antaŭ ol subite trudi sin ĉe la surfaco. Klara superrigardo super la ekonomia historio de donita periodo fareblas neniam samtempe, nur postfakte, post farita kolektado kaj kribrado de la materialo. La statistiko estas ĉi tie necesa helprimedo, kaj ĝi ĉiam postlamas. Por la okazanta aktuala historio oni estas do tro ofte devigata pritrakti tiun plej decidan faktoron kvazaŭ konstantan, la ekonomian situacion trovitan ĉe la komenco de la koncerna periodo kiel donitan por la tuta periodo kaj kiel senŝanĝan aŭ konsideri nur tiajn ŝanĝojn de tiu situacio, kiuj fontas el la malkaŝe videblaj okazaĵoj mem kaj kiuj pro tio estas ankaŭ malkaŝe videblaj. Pro tio la materiisma metodo devas do ĉi tie tro ofte limigi sin al tio, ke ĝi reduktas la politikajn konfliktojn al interesbataloj de la sociaj klasoj kaj klasaj frakcioj donitaj de la ekonomia evoluo kaj prui la

2 Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke ktp, (*en la librofina listo de libroj aperintaj ĉe MAS la n-ro 52*). -vl

unuopajn politikajn partiojn kiel la pli aŭ malpli adekvatan politikan esprimiĝon de tiuj samaj klasoj kaj klasaj frakcioj.

Estas memkomprenebla, ke tiu neevitebla neglekto de la samtempaj ŝanĝiĝoj de la ekonomia situacio, de la vera bazo de ĉiuj esplorendaj okazaĵoj, devas esti fonto de eraroj. Sed ĉiuj kondiĉoj de resuma prezentado de aktuala historio entenas neeviteble erarfontojn; kio tamen nenium malebligas verki aktualan historion.

Kiam Markso komencis tiun laboraĵon, la menciita erarfonto estis ankoraŭ multe pli neevitebla. Sekvi la samtempe okazantajn ekonomiajn ŝanĝojn dum la tempo de la revolucio de 1848/49 aŭ eĉ konservi la super-rigardon super ili, estis simple malebla. Same pri la unuaj monatoj de la ekzilo en Londono, dum la aŭtuno kaj la vintro de 1849/50. Sed ĝuste tiu estis la tempo, en kiu Markso komencis la laboraĵon. Kaj spite al tiuj mal-favoraj cirkonstancoj lia preciza kono same de la ekonomia situacio de Francio antaŭ la februara revolucio kiel de la politika historio de tiu lando post tiu revolucio kapablis lin prezenti la okazaĵojn tiel, ke ilia interna interplektiĝo estas malkovrita en maniero eĉ poste ne atingita kaj kiu poste sukcesis la duoblan provon, kiun Markso faris mem.

La unua provo okazis per tio, ke ekde la printempo 1850 Markso havis ree tempon por ekonomiaj studoj kaj unue okupiĝis pri la ekonomia historio de la lastaj dek jaroj. Per tio li gajnis el la faktoj mem kompletan klarecon pri tio, kion li ĝis tiam nur duone apriorie konkludis el mankhava materialo: ke la mondkomerca krizo de 1847 estis la vera patrino de la februara kaj marta revolucioj kaj ke la industria prospero, kiu iom post iom komenciĝis ekde la mezo de 1848 kaj en 1849 kaj 1850 atingis sian plenan floriĝon, estis la viviga forto de la nove fortiĝinta eŭropa reakcio. Tio estis decida. Dum en la tri unuaj artikoloj (aperintaj en la januara, februara kaj marta kajeroj de la „Nova Rejna Gazeto. Politika-ekonomia revuo”, Hamburgo, 1850) ankoraŭ trairas la atendo de baldaŭa nova impeto de revolucia energio, la historia superrigardo de la lasta, duobla kajero aperinta en la aŭtuno de 1850 rompas unufoje por ĉiam tiujn iluziojn: *„Nova revolucio eblas nur sekve al nova krizo. Sed ĝi estas ankaŭ same certa kiel tiu ĉi.”* Sed tio estis ankaŭ la sola farenda esenca ŝanĝo. Pri la interpreto de la okazaĵoj donita en la antaŭaj paragrafoj, pri la tie montritaj internaj interplektiĝoj, absolute nenio estis ŝanĝinda, kion pravas la daŭrigo de la rakonto de la 10-a de marto ĝis la aŭtuno de 1850, farita en la sama superrigardo. Pro tio mi enprenis tiun daŭrigon kiel kvaran artikolon en la nuna novpresaĵo.

La dua provo estis ankoraŭ pli rigora. Tuj post la puĉo de Louis Bonaparte de la 2-a de decembro 1851 Markso denove prilaboris la historion de Francio de februaro 1848 ĝis tiu evento, kiu provizore finis la revolucion periodon. („La 18-a brumero de Louis Bonaparte”, tria eldono, Hamburgo, Meißner, 1885.) En tiu broŝuro la periodo prezentita en nia skribaĵo estas denove pritraktita, kvankam pli mallonge. Oni komparu tiun duan prezentadon, verkitan en la lumo de la evento okazinta jaron poste, kun nia prezentado, kaj oni trovos, ke la aŭtoro devis ŝanĝi nur tre malmulton.

Kio donas al nia skribaĵo ankoraŭ tute apartan gravecon, estas la cirkonstanco, ke ĝi la ununa eldiras la formulon, per kiu la ĝenerala interkonsento de la laboristaj partioj de ĉiuj landoj en la mondo mallonge resumas sian postulon je ekonomia novformado: la alproprigo de la produktadrimedoj fare de la socio. En la dua ĉapitro, okaze de la „rajto je laboro”, nomata kiel „unua mallerta formulo, per kiu la revoluciaj pretendoj de la proletaro resumiĝas”, tekstas: „... sed malantaŭ la rajto je laboro staras la povo super la kapitalo, malantaŭ la povo super la kapitalo la alproprigo de la produktadrimedoj, ilia submeto sub la asociitan laboristan klason, do la forigo de la dunglaboro kaj de la kapitalo kaj de ilia reciproka rilato.” Ĉi tie do formuliĝas – por la unua fojo – la frazo, per kiu la moderna laborista socialismo akre distingas sin same disde ĉiaj diversaj nuanciĝoj de la feŭda, burĝa, etburĝa ktp socialismo kiel ankaŭ disde la nebula komuna posedo de havaĵoj de la utopia kaj de la sponta laborista komunismo. Kiam Markso poste etendis la formulon al alproprigo ankaŭ de la interŝanĝrimedoj, tiam tiu etendo, kiu cetere post la „Komunista Manifesto” estis memkomprenebla, esprimis nur korolarion de la ĉefa frazo. Kelkaj saĝuloj en Anglio lastatempe ankoraŭ aldonis, ke ankaŭ la „rimedoj de la distribuado” estas transigitaj al la socio. Tiuj sinjoroj estus en embaraso, se ili devus diri, kiaj estas tiuj ekonomiaj distribu-rimedoj aliaj ol la produktad- kaj interŝanĝrimedoj, se ne estas politikaj distribu-rimedoj, impostoj, subteno por malriĉuloj, inkluzive de la dotaĵoj kiel ekz-e tiu de *Sachsenwald*. Sed tiuj estas unue ja jam nun distriburimedoj en la posedo de la tutaĵo, de la ŝtato aŭ de la komunumo, kaj due ni ja ĝuste volas forigi ilin.

Kiam la februara revolucio eksplodis, ni ĉiuj, koncerne niajn imagojn pri la kondiĉoj kaj la evoluo de revoluciaj movadoj, troviĝis sub la impresego de la ĝisnuna historia sperto, nome de tiu de Francio. Tiu revolucio estis ja

tiu, kiu dominis la tutan eŭropan historion ekde 1789, de kiu ankaŭ nun ree eliris la signalo al ĝenerala transformego. Tiel estis memkomprenebla kaj neevitebla, ke niaj ideoj pro la naturo kaj la evoluo de la „sociala” revolucio proklamita en Parizo, en la februaro de 1848, la revolucio de la proletaro, estis forte koloritaj de la memoro pri la modeloj de 1789-1830. Kaj tiom pli, kiam la pariza ribelo reeĥis en la venkaj ribeloj de Vieno, Milano, Berlino, kiam la tuta Eŭropo ĝis la rusa landlimo kuntiriĝis en la movadon; kiam poste en junio en Parizo la unua granda batalo por la regado inter proletaro kaj burĝaro estis batalata; kaj kiam eĉ la venko de sia klaso skuis la burĝaron de ĉiuj landoj tiom, ke ĝi rifuĝis en la brakojn de la ĵus faligita monarĥisma-feŭdisma reakcio – tiam sub la tiamaj kondiĉoj ni ne povis dubi, ke la granda decidbatalo komenciĝis, ke ĝi devas esti elbatalata en unusola certe longa kaj ŝanĝiĝema revolucia periodo, kiu tamen povas finiĝi nur per la definitiva venko de la proletaro.

Post la malvenkoj de 1849 ni neniel dividis la iluziojn de la vulgardemokratio grupiĝinta parte por la estontaj provizoraj registaroj. Tiu kalkulis kun baldaŭa, unufoje por ĉiam decida venko de la „popolo” super la „premantoj”; ni kun longa batalo, post forigo de la „premuloj” inter la kontraŭaj elementoj kaŝiĝantaj en tiu ĉi „popolo”. La vulgardemokratio atendis la denovan eksplodon de unu tago al la alia; ni deklaris jam en la aŭtuno de 1850, ke almenaŭ la unua sekcio de la revolucia periodo estas finita kaj ke oni povas nenion atendi ĝis la eksplodo de nova ekonomia mondkrizo. Pro tio ni estis ankaŭ kalumniataj kiel perfiduloj je la revolucio, de la samaj homoj, kiuj poste senescepte faris sian pacon kun Bismarko – almenaŭ tiuj, pri kiuj Bismarko opiniis ke ili valoras la penon.

Sed la historio malpravigis ankaŭ nin, senvualigis nian tiaman opinion kiel iluzion. Ĝi iris ankoraŭ pli antaŭen: ĝi ne nur detruis nian tiaman eraron, ĝi ankaŭ totale transformegis la kondiĉojn, sub kiuj la proletaro devas batali. La batalmaniero de 1848 estas hodiaŭ ĉiarilate arĥaiĝinta, kaj tio estas punkto, kiu ĉi-okaze meritas pli detalan esploron.

Ĉiuj ĝisnunaj revolucioj rezultis per anstataŭo de certa klasa dominado per alia; sed ĉiuj ĝisnunaj posedaj klasoj estis nur etaj malplimultoj fronte al la dominata popolamaso. Reganta malplimulto tiel estis faligita, alia malplimulto kaptis en ties loko la stirilon de la ŝtato kaj transformis la ŝtatajn instituciojn laŭ siaj interesoj. Tiu estis ĉiufoje tiu malplimulta grupo, kiun la ŝtato de la ekonomia evoluo kapabligis kaj alvokis al regado, kaj ĝuste tial kaj nur tial okazis, ke la regata plimulto partoprenis en la transformego aŭ

almenaŭ trankvile toleris ĝin. Sed se ni abstraktas la ĉiufojan konkretan enhavon, la komuna formo de ĉiuj ĉi revolucioj estas tiu, ke ili estis revolucioj de malplimultoj. Eĉ kiam la plimulto helpis en tio, tio okazis – ĉu scie aŭ ne – nur en la servo de malplimulto; sed tiu akiris per tio, aŭ eĉ jam nur pro la pasiva senrezista sinteno de la plimulto, la ŝajnon kvazaŭ ĝi estus la reprezentanto de la tuta popolo.

Post la unua granda sukceso ĝenerale la venka malplimulto fendiĝis; unu duono kontentis pri la atingiĝo, la alia volis iri ankoraŭ pli antaŭen, faris novajn postulojn, kiuj almenaŭ parte estis ankaŭ en la reala aŭ ŝajna intereso de la granda popolamaso. Tiuj pli radikalaj postuloj estis ankaŭ truditaj en kelkaj kazoj; sed oftege nur por la momento, la pli modera partio refariĝis pli forta, la lastaj atingiĝoj perdiĝis tute aŭ parte; tiam la venkitoj kriegis je perfido aŭ atribuis la malvenkon al la hazardo. Sed en la realo la aferoj estis plej ofte tiel: La atingoj de la unua venko estis certigitaj nur per la dua venko de la pli radikala partio; kiam tio estis atingita kaj per tio la momente plej necesa, tiam la radikaluloj kaj iliaj sukcesoj malaperis de la scenejo.

Ĉiuj revolucioj de la nova tempo, unue la grandaj anglaj de la deksepa jarcento, montris tiujn trajtojn, kiuj ŝajnis nedisigeblaj de ĉia revolucia batalo. Ili ŝajnis esti aplikeblaj ankaŭ al la batalo de la proletaro por ĝia emancipiĝo; aplikeblaj tiom pli, ke ĝuste en la jaro 1848 la homoj estis nombreblaj, kiuj eĉ nur iomete komprenis, en kiu direkto la emancipiĝo estis serĉenda. La proletaj amasoj mem estis eĉ en Parizo ankoraŭ post la venko absolute sensciaj pri la irenda vojo. Kaj tamen la movado ekzistis, instinkte, sponte, ne subpremebla. Ĉu tio ne estis ĝuste la situacio, en kiu la revolucio devis sukcesi, gvidata ja de malplimulto, sed ĉi-foje ne en la intereso de la malplimulto, sed en la plej ĝusta intereso de la plimulto? Se en ĉiuj iom longaj revoluciaj periodoj la grandaj popolamasoj estis tiom facile gajneblaj jam per nur kompreneblaj ŝajnigoj de la antaŭenirantaj malplimultoj, kial ili estus malpli alireblaj por ideoj, kiuj estis la plej ĝuste propra speguliĝo de ilia ekonomia situacio, kiuj estis nenio alia ol la klara, racia esprimo de iliaj bezonoj, de ili mem ankoraŭ ne komprenataj, unue nur malklare sentataj? Tamen tiu revolucia animstato de la amasoj preskaŭ ĉiam, kaj plej ofte tre baldaŭ, cedis al laciĝo aŭ eĉ al ŝanĝiĝo en la malon, ekde kiam la iluzio estis forvapiĝinta kaj la seniluziigo aperinta. Sed ĉi tie ne temis pri ŝajnigoj, sed pri la realigado de la plej propraj interesoj de la granda plimulto mem, interesoj kiuj tiutempe ja tute ne estis klaraj al tiu granda plimulto, kiuj tamen devis sufiĉe baldaŭ klariĝi al ĝi, en la evoluo de la praktika realigado, per konvinka evidenteco. Kaj se nun eĉ – kiel pruvite

en la tria artikolo de Markso – en la printempo de 1850 la evoluo de la burĝa respubliko, estiĝinta el la „sociala” revolucio de 1848, koncentras la realan regadon en la manoj de la grandburĝaro – kiu krome pensis monarĥisme –, kaj male, ĉiujn aliajn sociajn klasojn, kampulojn kiel etburĝojn, grupigis ĉirkaŭ la proletaron, tiel, ke dum kaj post la komuna venko ne la grandburĝaro, sed la proletaro, saĝiĝinta per sia sperto, devis fariĝi la decida faktoro – ĉu tiam ne ekzistis ĉia perspektivo por la transiĝo de la revolucio de malplimulto en la revolucion de la plimulto?

La historio malpravigis nin kaj ĉiujn, kiuj pensis simile. Ĝi klarigis, ke la stato de la ekonomia evoluo sur la kontinento tiam estis ankoraŭ delonge ne matura por la forigo de la kapitalisma produktado; ĝi pruvis tion per la ekonomia revolucio, kiu de 1848 kaptis la tutan kontinenton kaj envere nur tiam hejmis la grandan industrion en Francio, Aŭstrio, Hungario, Pollando kaj lastatempe Ruslando, sed faris el Germanio industrilandon vere unuarangan – ĉion sur kapitalisma, en la jaro 1848 do ankoraŭ tre etendebla bazo. Sed ĝuste la industria revolucio ĉie nur kreis klarecon pri la klasrilatoj, forigis multajn interajn ekonomiajn agantojn devenajn el la manufakturo-periodo kaj en la orienta Eŭropo eĉ el la korporacia metio, kreis veran burĝaron kaj realan grandindustrian proletaron kaj ŝovis ĝin en la antaŭon de la socia evoluo. Sed per tio la batalo de tiuj du grandaj klasoj, kiu okazis en la jaro 1848 ekstere de Anglio nur en Parizo kaj se entute nur en kelkaj grandaj industricentroj, disvastiĝis tra la tuta Eŭropo kaj akiris intenson, kiu estis en la jaro 1848 ankoraŭ nepensebla. Tiutempe la multaj malklaraj evangelioj de sektoj kun siaj panaceoj, hodiaŭ la unu ĝenerale agnoskata, travideble klara, la lastajn celojn de la batalo akre formulanta teorio de Markso; tiutempe la amasoj disigitaj kaj malsamaj laŭ loko kaj nacieco, interligitaj nur per la sento de komunaj suferoj, subevoluintaj, ŝanceliĝantaj inter entuziasmo kaj malespero; hodiaŭ la unu granda internacia armeo de socialistoj, nehaltigeble antaŭen paŝanta, ĉiutage kreskanta je nombro, organiziteco kaj disciplino, kompreno kaj venkocerteco. Se eĉ tiu potenca armeo de la proletaro daŭre ne atingis la celon, se ĝi, anstataŭ akiri la venkon per unu granda bato, devas malrapide ŝovi sin antaŭen de pozicio al pozicio, tio pruvas unufoje por ĉiam, kiom malebla estis en 1848 konkeri la socialan transformadon per simpla surpriza preno.

Burĝaro fendita en du dinastie-monarĥiaj sekcioj, kiu tamen antaŭ ĉio postulis trankvilon kaj sekurecon por siaj monaferoj, fronte al ĝi proletaro ja venkita, sed daŭre minaca, ĉirkaŭ kiu etburĝoj kaj kampuloj pli kaj pli grupiĝis – tiu konstanta minaco de perforta erupcio, kiu krome ne donis la

perspektivon de definitiva solvo –, jen la ideala situacio por la ŝtatrenverso de la tria, de la pseŭdodemokrata prezidanto Louis Bonaparte. Per la armeo tiu ĉesigis la streĉitan situacion la 2-an de decembro 1851 kaj certigis al Eŭropo la internan trankvilon, por kompanse feliĉigi ĝin per nova erao de militoj. La periodo de desubaj revolucioj estis provizore fermita: sekvis periodo de revolucioj desupraj.

La imperiisma retrobato de 1851 donis novan pruvon de la nematureco de la tiamaj proletaj aspiroj. Sed ĝi mem kreis la kondiĉojn, sub kiuj ili devis maturiĝi. La interna trankvilo certigis la plenan disvolviĝon de la nova industria impeto, la neceson laborigi la armeon kaj deturni la revoluciajn tendencojn al la ekstero, kreis la militojn, per kiuj Bonaparte, sub la preteksto respektigi la „principon de nacieco”, provis akapari aneksaĵojn por Francio. Lia imitanto Bismarko adoptis la saman politikon por Prusujo: li faris sian ŝtatrenversion, sian revolucion desupran kontraŭ la Germana Ligo kaj Aŭstrio kaj ne malpli kontraŭ la prusa konfliktoĉambro. Sed Eŭropo estis tro malgranda por du Bonapart-oj, kaj tiel la historia ironio volis, ke Bismarko faligis la Bonaparton kaj ke la reĝo Vilhelmo de Prusujo kreis ne nur la etgermanan imperion, sed ankaŭ la francan respublikon. Sed la ĝenerala rezulto estis, ke en Eŭropo la memstareco kaj interna unueco de la grandaj nacioj, kun la escepto de Pollando, fariĝis fakto. Kvankam ene de relative modestaj limoj – tamen tiom, ke la evoluprocezo de la laborista klaso jam ne estis esence malhelpata de naciaj implikaĵoj. La entombigistoj de la revolucio de 1848 fariĝis ĝiaj testamentaj plenumantoj. Kaj apud ili jam leviĝis minace la heredanto de 1848, la proletaro, en la Internacio.

Post la milito de 1870-1871 Bonaparte malaperis el la scenejo, kaj la misio de Bismarko estis plenumita, tiel ke li povis resinki al la ordinara junkro. Sed la finon de la periodo konsistigis la Pariza Komunumo. Insida provo de Thiers ŝteli al la Pariza Nacia Gvardio ĝiajn batalilojn, estigis venkan ribelon. Ree montriĝis, ke en Parizo jam ne eblas alia revolucio ol proleta. La regado falis al la laborista klaso kvazaŭ el la ĉielo post la venko, tute nekontestate. Kaj ree montriĝis, kiom malebla estis eĉ ankoraŭ tiam, dudek jarojn post la tempo priskribita en nia verko, la regado de la laborista klaso. Unuflanke Francio lasis Parizon sola, rigardis, kiel ĝi elsangiĝis sub la kugloj de Mahon; aliflanke la Komunumo konsumiĝis en senfrukta disputo de la du partioj, en kiuj ĝi estis fendita, de la blankiistoj (plimulto) kaj la prudonistoj (malplimulto), kiuj ambaŭ ne sciis kion fari. Same senfrukta kiel en 1848 la surpriza preno restis en 1871 la donacita venko.

Kun la Pariza Komunumo oni kredis esti definitive entombiginta la bataleman proletaron. Sed tute male, de la Komunumo kaj de la germana-franca milito datas ĝia plej potenca impeto. La totala transformego de la tutaj militaferoj per rekrutado de la tuta militkapbla loĝantaro en armeoj kalkuleblaj jam nur per milionoj, per pafarmiloj, pafaĵoj kaj eksplodaĵoj de ĝis tiam nekonata efiko, unuflanke abrupte ĉesigis la bonapartisman milit-periodon kaj certigis la pacan industrian evoluon, per tio ke ĝi malebligis ĉian alian militon ol mondmiliton de nekonata krueleco kaj de absolute nekalkulebla rezulto. Aliflanke per kostoj de armeo kreskantaj en geometria progreso ĝi pelis la impostojn en nepageblan altecon kaj per tio la iom malriĉajn popolklasojn en la brakojn de la socialismo. La aneksado de Alzaco-Lotaringo, la plej grava kaŭzo de la freneza konkurenco en militarmadoj, povis ŝovinisme inciti la francan kaj germanan burĝarojn reciproke; por la laboristoj de la du landoj ĝi fariĝis nova ligo de unuiĝo. Kaj la datreveno de la Pariza Komunumo fariĝis la unua ĝenerala festotago de la tuta proletaro.

La milito de 1870-1871 kaj la malvenko de la Komunumo ŝovis la gravitopunkton de la eŭropa laborista movado, kiel Markso antaŭdiris, provizore de Francio al Germanio. En Francio kompreneble necesis jaroj, ĝis kiam oni resaniĝis el la sangelverŝo de majo 1871. En Germanio, male, kie la industrio, krome forceje subtenata de la francaj miliardoj de militpagoj evoluis ĉiam pli rapide, la socialdemokrataro kreskis ankoraŭ pli rapide kaj pli daŭrigeble. Danke al la kompreno, per kiu la germanaj laboristoj uzis la ĝeneralan voĉdonrajton, enkondukitan en la jaro 1866, la miriga kresko de la partio prezentiĝas malkaŝe kaj nekontesteble antaŭ ĉiuj. 1871: 102.000, 1874: 352.000, 1877: 493.000 da socialdemokrataj voĉoj. Tiam venis la alta aŭtoritata agnosko de tiuj progresoj, en la formo de la socialistoleĝo; la partio estis provizore disigita, la nombro de voĉoj falis en 1881 al 312.000. Sed tio estis rapide superita, kaj nun, sub la premo de la urĝoleĝo, sen gazetaro, sen ekstera organizaĵo, sen la rajto je asocio kaj kunveno, nun komenciĝis la rapida etendiĝo des pli rapide: 1884: 550.000, 1887: 763.000, 1890: 1.427.000 voĉoj. Jen la mano de la ŝtato eklamis. La socialistoleĝo malaperis, la nombro de socialistaj voĉoj kreskis al 1.787.000, pli ol kvarono de ĉiuj voĉoj. La registaro kaj la regantaj klasoj estis elĉerpintaj ĉiujn siajn rimedojn – senutile, sencele, sensukcese. La palpeblaj pruvoj de ilia senpoveco, kiujn la instancoj, de la noktgardisto ĝis la ĉefministro, devis akcepti – kaj liveritaj de la malestimataj laboristoj! –, tiuj pruvoj estis je la nombro de milionoj. La ŝtato estis ĉe la fino de sia latino, la laboristoj nur ĉe la komenco de la sia.

Sed la germanaj laboristoj krome faris al sia afero ankoraŭ duan grandan servon apud la unuan, kiu estis donita per ilia nura ekzisto kiel la plej forta, la plej disciplinita, la plej rapide kreskanta socialista partio. Ili liveris al siaj kamaradoj de ĉiuj landoj novan armilon, unu el la plej akraj, per tio ke ili montris al ili, kiel uzi la ĝeneralan voĉdonrajton.

La ĝenerala voĉdonrajto ekzistis jam delonge en Francio, sed fariĝis fifama pro la misuzo, kiun la bonapartista registaro faris el ĝi. Post la Pariza Komunumo ne ekzistis laborista partio por uzi ĝin. Ankaŭ en Hispanio ĝi ekzistis ekde la respubliko, sed en Hispanio la sindeteno ĉe voĉdonado de ĉiuj seriozaj opoziciaj partioj estis de ĉiam la regulo. Ankaŭ la svisaj spertoj pri la ĝenerala voĉdonrajto estis ĉio alia ol instiga por laborista partio. La revoluciaj laboristoj de la latinidaj landoj alkutimiĝis vidi la voĉdonrajton kiel kaptilon, kiel instrumenton de la registara politiko. En Germanio tio estis alia. Jam la „Komunista Manifesto” proklamis la elbataladon de la ĝenerala voĉdonrajto, de la demokratio, kiel unu el la unuaj kaj plej gravaj taskoj de la batalema proletaro, kaj Lasalo siavice reprenis tiun punkton. Kiam Bismarko vidis sin devigata enkonduki tiun voĉdonrajton kiel solan rimedon interesi la popolamasojn por siaj planoj, tiam niaj laboristoj traktis tion tuj serioze kaj sendis Aŭguston Bebelo en la unuan konsistigendan parlamenton (*Reichstag*). Kaj de tiu tago ili uzis la voĉdonrajton en maniero, kiu miloble valoris ilian penon kaj kiu servis kiel modelo al la laboristoj de ĉiuj landoj. Ili transformis la voĉdonrajton, en la vortoj de la franca marksisma programo, el rimedo de trompo, kiu ĝi estis ĝis nun, en instrumenton de liberigo.³ Kaj se la ĝenerala voĉdonrajto ne havintus alian utilon ol ke ĝi permesis al ni, nombri nin ĉiujn tri jarojn; ke ĝi per la regule konstatata, neatendite rapida kresko de la voĉnombroj en sama mezuro kreskigis la venkocertecon de la laboristoj kiel la teruron de la kontraŭuloj kaj tiel fariĝis nia plej bona propagando-instrumento; ke ĝi precize instruis nin pri nia propra forto, kiel pri tiu de ĉiuj niaj kontraŭaj partioj kaj per tio liveris al ni mezurilon por la proporciigo de nia agado, tian kia ne ekzistas dua – avertis nin kontraŭ hezitemo en maltaŭga tempo same kiel kontraŭ antaŭtempa troaŭdaco –, se tio estus la sola utilo, kiun ni havas el la voĉdonrajto, tiam ĝi estus jam multe pli ol sufiĉa. Sed ĝi faris ankoraŭ multe pli. En la elekto-agitado ĝi liveris al ni rimedon tian, kia ne ekzistas dua, por kontaktiĝi kun la popolamasoj tie, kie ili estas ankoraŭ malproksimaj de ni,

3 En la franca: „*transformé, de moyen de duperie qu'il a été jusqu'ici, en instrument d'émancipation*”. – La Esperantigo sekvas ĉi tie la germanan tekston (tradukitan de Engelso). -vl

por devigi ĉiujn partiojn defendi siajn opiniojn kaj agojn kontraŭ niaj atakoj antaŭ la tuta popolo; kaj krome ĝi malfermis al niaj reprezentantoj en la parlamento tribunon, de kiu ili povis paroli kun tute alia aŭtoritato kaj libereco al siaj kontraŭuloj en la parlamento kiel al la amasoj ekstere ol en la gazetaro kaj en kunvenoj. Kian utilon havis por la registaro kaj por la burĝaro ilia socialistoleĝo, se la elekto-agitado kaj la socialistaj parlamentaj paroladoj konstante rompis ĝin?

Sed per tiu sukcesa uzado de la ĝenerala voĉdonrajto efikis tute nova batalmaniero de la proletaro, kaj tiu maniero rapide plu etendiĝis. Oni trovis, ke la ŝtataj institucioj, en kiuj la regado de la burĝaro organiziĝis, donas ankoraŭ aliajn manierojn, per kiuj la laborista klaso povas kontraŭbatali tiujn samajn ŝtatajn instituciojn. Oni partoprenis en la voĉdonadoj por la unuopaj regionaj parlamentoj, por komunumaj konsilantaroj, por metiaj juĝejoj, oni disputis kun la burĝaro pri ĉiu posteno, ĉe kies okupado sufiĉa parto de la proletaro kundecidis. Kaj tiel okazis, ke la burĝaro kaj la registaro fine multe pli timis la laŭleĝan ol la kontraŭleĝan agadon de la laborista partio, la sukcesojn de la elektoj ol tiujn de la ribelo.

Ĉar ankaŭ ĉi tie la kondiĉoj de la batalo esence ŝanĝiĝis. La malnovstila ribelo, la stratbatalo per barikadoj, kiu ĝis 1848 ĉie donis la lastan decidon, estis grave arĥaiginta.

Ni ne iluziiĝu pri tio: Reala venko de la ribelo super la armeo en stratbatalo, venko kiel inter du armeoj, apartenas al la plej grandaj maloftaĵoj. Sed ankaŭ la ribelantoj same malofte intencis tion. Por ili temis nur pri la intenco cedemigi la trupojn per moralaj influoj, kiuj en batalo inter armeoj de du militantaj landoj tute ne ludas rolon aŭ tamen nur en multe malpli alta grado. Se tio sukcesas, tiam la trupo ne funkcias aŭ la ordonantoj emociiĝas[[[verlieren den Kopf]]] kaj la ribelo venkas. Se tio ne sukcesas, tiam, eĉ ĉe malpli alta nombro flanke de la armeo, efikas la supereco de la pli bonaj ekipaĵo kaj trejnado, de la unueca gvido, de la laŭplana uzado de la militfortoj kaj la disciplino. La plej alta celo, kiun la ribelo en vere taktika ago povas atingi, estas la arta strukturo kaj defendo de unuopa barikado. Reciproka subteno, starigo aŭ uzado de rezervoj, mallonge, la kunefikado kaj interagado de la unuopaj partoj, nepra jam por defendo de urba distrikto, por ne paroli pri tuta urbo, atingeblas nur tre mankhavaj, kaj plej ofte tute ne atingeblas; koncentriĝo de la militaj fortoj al decida punkto en tia situacio tute maleblas. Pro tio la pasiva defendo estas la ĉefa batalformo; atako ie kaj tie, sed ankaŭ nur esceptokaze, aŭdacas fari okazajn avancojn kaj flankajn

atakojn, sed ordinare limigas sin al okupado de la pozicioj forlasitaj de la cedantaj trupoj. Flanke de la armeo aldoniĝas ankoraŭ la dispono pri kanonoj kaj komplete ekipitaj kaj trejnitaj pioniraj trupoj, batalrimedoj, kiuj en preskaŭ ĉiuj kazoj tute mankas al la ribelantoj. Do ne estas mirige, ke eĉ la barikadaj bataloj faritaj kun la plej granda heroeco – en Parizo de junio 1848, Vieno oktobro 1848, Dresdeno majo 1849 – finiĝis per la malvenko de la ribelo, ekde kiam la atakantaj gvidantoj, neĝenataj de politikaj konsideroj, agis laŭ pure militaj vidmanieroj kaj iliaj soldatoj restis fidindaj.

La multnombraj sukcesoj de la ribelantoj ĝis 1848 ŝuldiĝas al tre diversaj kaŭzoj. En Parizo en julio 1830 kaj februaro 1848, kiel en la plej multaj hispanaj stratbataloj, inter la ribelantoj kaj la armeo staris civitana milico⁴, kiu aŭ rekte transiris al la flanko de la ribelo aŭ per nefervora, sendecida sinteno ankaŭ ŝancelis la trupojn kaj krome liveris armilojn al la ribelo. Tie, kie tiu civitana milico dekomence elpaŝis kontraŭ la ribelo, kiel en junio 1848 en Parizo, tiu estis ankaŭ venkita. En Berlino en 1848 la popolo venkis parte pro la konsiderinda alkresko de novaj batalfortoj dum la nokto kaj la mateno de la 19-a [de marto], parte pro la elĉerpiĝo kaj malbona nutrado de la trupoj, parte fine pro la eklamanta ordonado. Sed en ĉiuj kazoj la venko estis elbatalita ĉar la trupo ne funkciis, ĉar al la ordonantoj ekmankis decidero aŭ ĉar ili ne rajtis sufiĉe libere decidi.

Eĉ en la klasika tempo de la stratbataloj la barikado efikis do pli morale ol materie. Ĝi estis rimedo por ŝanceli la firmecon de la armeo. Se ĝi rezistis ĝis kiam tio sukcesis, tiam la venko estis atingita: se ne, oni estis venkita. {Tiu estas la ĉefa punkto konsiderenda, ankaŭ kiam oni esploras la ŝancojn de eblaj estontaj stratbataloj.}⁵

Tiuj ŝancoj⁶ estis jam en la jaro 1849 sufiĉe malbonaj. La burĝaro ĉie aliĝis al la flanko de la registaro, „klereco kaj posedo” salutis kaj gastigis la militistojn irantajn kontraŭ ribeluloj. La barikado jam perdis sian ĉarmon; la soldato vidis malantaŭ ĝi jam ne „la popolon”, sed ribelulojn, subfosantojn, ŝtelistojn, dividulojn, la feĉon de la socio; la oficiro en la tempo lertiĝis pri la taktikaj formoj de la stratbatalo, li jam ne marŝis rekte kaj neŝirmate al la improvizita brustdefendo, sed ĉirkaŭiris ĝin tra ĝardenoj, kortoj kaj domoj.

4 Germane: *Bürgerwehr*. -vl

5 Kunigaj krampoj indikas teksterojn, kiujn la berlina partiestraro forstrekis pro la „ŝtatenversindiktimoficaj rezervoj” (Engelso). [La vortmonstro fidele redonas la germanan ekvivalenton, ironia formulo de Engelso. -vl]

6 2-a versio: La ŝancoj estis cetere ...

Kaj tio nun, kun iom da lerteco, sukcesis en naŭ kazoj el dek.

Sed de tiam ankoraŭ tre multo ŝanĝiĝis, kaj ĉio favore al la armeo. Dum la grandurboj konsiderinde grandiĝis, tiom pli grandiĝis la armeoj. Parizo kaj Berlino ekde 1848 ne kreskis kvaroble, sed iliaj garnizonoj pli ol tio. Per fervojoj tiuj garnizonoj povas ene de 24 horoj pli ol duobliĝi, en 48 horoj ŝveliĝi al gigantaj armeoj. La armila ekipaĵo de tiu eksterordinare fortigita nombro de trupoj fariĝis senkompare pli efika. En 1848 estis la glata perkut-antaŭŝarga fusilo, hodiaŭ la etkalibra kuglara malantaŭŝarga fusilo, kiu pafas kvaroble pli malproksimen, dekoble pli precize kaj dekoble pli rapide ol tiu. En 1848 la plenkugloj kun relative malforta efiko kaj mitraloj de la artilerio, hodiaŭ la perkutaj granatoj, el kiuj unu sufiĉas por dispecigi la plej bonan barikadon. En 1848 la pioĉo de la pioniro por disrompi fajroprotektajn murojn, hodiaŭ la dinamitkartoĉo.

Sed ĉe la flanko de la ribelantoj ĉiuj kondiĉoj malboniĝis. Ribelo, kun kiu ĉiuj popoltavoloj simpatias, apenaŭ revenos; en la kasbatalo verŝajne neniam ĉiuj mezaj tavoloj grupiĝos ekskluzive ĉirkaŭ la proletaro, tiel ke la reakcia partio, kiu grupiĝas ĉirkaŭ la burĝaro, preskaŭ malaperu. La „popolo” aperos do ĉiam dividita, kaj pro tio mankas potenca levilo, kiu estis en 1848 eksterordinare efika. Se ĉe la flanko de la ribeluloj troviĝas⁷ pli da militservintaj soldatoj, ilia armado fariĝas des pli malfacila. La ĉaspafiloj kaj luksaj pafiloj de la armilvendejoj – eĉ se la polico ne antaŭe igis ilin neuzeblaj per forpreno de la **serurparto** – ankaŭ en **proksimbatalo** tute ne kompareblas kun la kuglarpafilo de la soldato. Ĝis 1848 oni povis el pulvo kaj plumbo fari la necesan municion mem, hodiaŭ la kartoĉo estas malsama por ĉia pafilo kaj samas nur en unu punkto: ke ĝi estas artprodukto de la granda industrio, do ne en la momentoproduktebla, ke do la plej multaj pafiloj estas senutilaj, se oni ne havas la speciale por ĝi bezonatan municion. Kaj fine la kvartaloj nove konstruitaj de la grandaj urboj post 1848 estas faritaj laŭ longaj, larĝaj stratoj, idealaj por la efiko de la novaj kanonoj kaj fusiloj. La revoluciulo devas esti freneza, kiu mem elektus la novajn laborist-distriktojn en la nordo kaj oriento de Berlino por barikada batalo.

{Ĉu tio signifas, ke estontece la stratbatalo jam ne ludos rolon? Tute ne. Ĝi signifas nur, ke la kondiĉoj post 1848 fariĝis multe pli malfavoraj por la civilaj batalantoj, multe pli favoraj por la militistoj. Estonta stratbatalo povas do nur esti venka, se la malfavoro de la situacio estas kompensata per aliaj elementoj. Ĝi okazos do pli malofte ĉe la komenco de granda revolucio

7 2-a eldono: Eĉ se ĉe la flanko de la ribeluloj troviĝus ...

ol en ties plua evoluo kaj estos farenda de pli grandaj fortoj. Sed tiuj, kiel en la tuta granda franca revolucio la 4-an de septembro kaj 31-an de oktobro 1870 en Parizo – verŝajne preferos la rektan atakon al la taktiko de pasiva barikado.}

Ĉu la leganto nun komprenas, kial la regantaj potencoj⁸ volas simple direkti nin tien, kie la fusilo pafas kaj la sabro batas? Kial oni hodiaŭ akuzas nin je malkuraĝo, ĉar ni ne simple iras sur la straton, kie la malvenko jam antaŭe certas? Kial oni tiom insiste petegas fine ludi la rolon de kanonnutr-aĵo?

La sinjoroj malŝparas siajn petojn kaj defiojn tute vane. Ni ne estas tiom stultaj. Ili povus same postuli de sia malamiko en la venonta milito, ke ĝi posteniĝu en la linia formacio de la olda Frico⁹ aŭ en la kolonoj de tutaj divizioj en la maniero de Vagramo kaj Vaterlo, kaj kun la ŝtonsparkila pafilo en la mano. La kondiĉoj ŝanĝiĝis por la popolmilito, sed ne malpli por la klasbatalo. La epoko de la surprizaj prenoj, de revolucioj farataj de etaj konsciaj malplimultoj ĉe la pinto de senkonsciaj amasoj estas for. Kie temas pri kompleta transformado de la socia organizaĵo, tie la amasoj devas partopreni mem, devas mem jam esti komprenintaj pri kio temas, por kio ili engaĝiĝas per sia korpo kaj vivo¹⁰. Tion la historio instruis al ni en la lastaj kvindek jaroj. Sed por ke la amasoj komprenu tion, kio estas farenda, por tio necesas longa daŭrema laboro, kaj ĝuste tiu laboro estas tio, kion ni faras nun, kaj tion kun sukceso, kiu malesperigas la kontraŭulojn.

Ankaŭ en la latinidaj landoj oni pli kaj pli komprenas, ke oni devas revizii la malnovan taktikon. Ĉie oni imitis la germanan modelon de uzado de la voĉdonrajto, de la konkero de ĉiuj al ni alireblaj postenoj{, ĉie la nepreparita ekbatado cedis en la fonon.} En Francio, kie la grundo de pli ol cent jaroj estas subfosita de revolucio post revolucio, kie ekzistas eĉ ne unu sola partio, kiu ne partoprenis en konspiroj, ribeloj kaj ĉiaj cetera revoluciaj agoj; en Francio, kie pro tio la armeo de la registaro tute ne povas esti sekura kaj kie entute la cirkonstancoj por ribela atako estas multe pli favoraj ol en Germanio – eĉ en Francio la socialistoj pli kaj pli komprenas, ke por ili daŭrema venko ne eblas, escepte se ili antaŭe gajnas la grandan amason de la popolo, t.e. ĉi-kaze la kampulojn. Malrapida laboro de propagando kaj

8 2-a versio: klasoj.

9 Popola kromnomo de la prusa reĝo Frederiko la 2-a, ankaŭ nomata Frederiko la Granda. -vl

10 2-a eldono: por kio ili engaĝiĝu ...

parlamentara agado estas ankaŭ tie komprenataj kiel plej proksima tasko de la partio. La sukcesoj ne forestis. Oni ne nur konkeris tutan serion da komunumaj konsilantaroj; en la ĉambroj sidas 50 socialistoj, kaj tiuj jam faligis tri ministrojn kaj unu prezidanton de la respubliko. En Belgio la laboristoj lastan jaron eldevigis la voĉdonrajton kaj venkis en kvarono de la elekto-distriktoj. En Svislando, en Italio, en Danlando, kaj eĉ en Bulgario kaj Rumanio la socialistoj estas reprezentataj en la parlamentoj. En Aŭstrio ĉiuj partioj samopinias, ke oni ne povas pli longe rifuzi al ni la aliron al la imperia konsilantaro. Ni eniros ĝin, tio certas, oni nur ankoraŭ disputas pri tio: tra kia pordo. Kaj eĉ se en Ruslando la fama *Semski Ŝor* kunvenas, tiu nacia asembleo, kontraŭ kiu la juna Nikolao tiom vane rezistas, eĉ tie ni povas kun certeco kalkuli, ke ankaŭ tie ni estos reprezentataj.

Kompreneble niaj eksterlandaj kamaradoj ne rezignas pri sia rajto je revolucio. La rajto je revolucio estas ja entute la sola vere „historia rajto”, la sola, sur kiu senescepte ĉiuj modernaj ŝtatoj baziĝas, inkluzive de Meklenburgo, kies nobela revolucio estis en 1755 finita per la „hereda interkonsento”, la ankoraŭ hodiaŭ valida garantio de feŭdismo. La rajto je revolucio estas tiom neŝanceleble agnoskita en la ĝenerala konscio, ke eĉ la [prusa] generalo von Boguslavski deduktas sole el tiu popolrajto la rajton je ŝtatrenverso, kiun li indikas al sia imperiestro.

Sed sendepende de tio, kio povas okazi en aliaj landoj, la germana socialdemokratara havas apartan pozicion kaj per tio almenaŭ nun ankaŭ apartan taskon. La du milionoj da elektantoj, kiujn ĝi sendas al la elekto-urnoj, apud la junaj viroj kaj la virinoj, kiuj staras kiel neelektantoj apud ili, konsistigas la plej multnombran, la plej kompaktan amason, la decidan „perfortamason” de la internacia proletara armeo. Tiu amaso liveras jam nun pli ol kvaronon de la donitaj voĉoj; kaj, kiel la unuopaj elektoj por la regna parlamento, la elektoj por la parlamentoj de la regnaj landoj, la elektoj por la komunumaj konsilantaroj kaj por la metiaj tribunaloj pravas, ĝi senĉese kreskas. Ĝia kresko okazas tiom sponte, tiom konstante, tiom nehaltigeble kaj samtempe tiom trankvile kiel naturprocezo. Ĉiuj intervenoj de la registaro montriĝis senpovaj kontraŭ ĝi. Ni povas jam hodiaŭ kalkuli pri 2¹/₄ milionoj da voĉdonantoj. Se tio tiel progresos, tiam ni havos ĝis la fino de la jarcento la pli grandan parton de la mezaj tavoloj de la socio, etburĝojn kiel etkampulojn, kaj kreskos al la decida potenco en la lando, antaŭ kiu ĉiuj aliaj potencoj devas kliniĝi, ĉu vole aŭ ne. Teni tiun kreskad-

on seninterrompa, ĝis kiam ĝi per si mem kreskos super la kapon de la nuna¹¹ regadsistemo, {ne disfroti tiun ĉiutage fortiĝantan perfortamason en antaŭgvardiaj bataloj, sed konservi ĝin funkcia ĝis la decida tago,} jen nia ĉefa tasko. Kaj tiam ekzistas nur unu sola rimedo, per kiu la konstanta ŝveliĝo de la socialistaj batalfortoj en Germanio estus provizore haltigebla kaj eĉ por kelka tempo reĵetebla: grandskala kolizio kun la armeo, sang-elverŝo kiel en 1871 en Parizo. Kun la tempo eĉ tio supereblus. Forpafi el la mondo partion, kies nombro estas milionoj, por tio ne sufiĉas ĉiuj kuglar-fusiloj de Eŭropo kaj Usono. Sed la normala evoluo estus malhelpata, {la perfortamaso en la kritika momento eble ne estus disponebla,} la decida batalo¹² malfruiĝus, longiĝus kaj ligiĝus kun pli gravaj viktimoj.

La ironio de la mondhistorio metas ĉion sur la kapon. Ni, la „revolucioj”, la „renversuloj”, ni prosperas multe pli bone ĉe la laŭleĝaj rimedoj ol ĉe la kontraŭleĝaj kaj per la ŝtatrenverso. La ordo-partioj, kiel ili nomas sin mem, pereas per la leĝa stato, kiun ili kreis mem. Ili krias malespere kun Odilon Barrot: *la légalité nous tue*, la leĝeco estas nia morto, dum ni ĉe tiu leĝeco akiras dikajn muskolojn kaj ruĝajn vangojn kaj aspektas kiel la eterna vivo. Kaj se ni ne estas tiom frenezaj komplezi ilin tiel ke ni lasas nin peli en la stratbatalon, tiam restas al ili fine nenio alia ol mem rompi la leĝecon, kiu estas tiom fatala al ili.

En la momento ili faras novajn leĝojn kontraŭ la ŝtatrenverso. Ree ĉio estas metita sur la kapon. Tiuj fanatikuloj de la kontraŭrenverso de hodiaŭ, ĉu ili ne estas mem la renversintoj de hieraŭ? Ĉu al la interna milito de 1866 eble instigis ni? Ĉu estis ni, kiuj forpelis la reĝon de Hanovro, la elekto-princon de Hesujo el iliaj heredaj, laŭleĝaj landoj kaj aneksis tiujn heredajn landojn? Kaj tiuj renversistoj de la Germana Ligo kaj de tri difavoraj kronoj plendas pri ŝtatrenverso? Kiu permesos al la Graĥoj plendi pri ribelo?¹³ (Juvenalo, „Satioj”, II24) Kiu povus permesi al la adorantoj de Bismarko insulti la renversulojn?

Intertempe ili trudu siajn kontraŭrenversajn leĝojn, ili ankoraŭ pli fiigu ilin, transformu la tutan punleĝon en kaŭĉukon, ili tamen atingos nenion ol la novan pruvon de sia senpoveco. Serioze ataki la socialdemokraton

11 2-a eldono: reganta ...

12 2-a versio: la decido ...

13 En la originalo ankaŭ latine: *Quis tulerit Gracchos de seditione querentes?* -vl

renversion, kiu en la momento vivas per tio¹⁴ ke ĝi respektas la leĝojn, ili povas nur per la ordopartia renverso, kiu ne povas vivi sen rompi la leĝojn. S-ro Rößler, la prusa burokrato, kaj s-ro von Boguslavski, la prusa generalo, montris al ili la solan vojon, per kiu oni eble ankoraŭ povas tuŝi la laboristojn, kiuj tute ne volas lasi sin logi en la stratbatalon. Rompo de la konstitucio, diktatoreco, reveno al la absolutismo, la volo de la reĝo la plej alta leĝo!¹⁵ Do, kuraĝon, sinjoroj, ĉi tie ne helpas pintigi la buŝon, ĉi tie necesas ankaŭ fajfi!

Sed ne forgesu, ke la Germana Imperio, kiel ĉiuj ŝtatoj kaj entute ĉiuj modernaj ŝtatoj, estas produkto de kontrakto; la kontrakto unue de la princoj inter si, due de la princoj kun la popolo. Se unu el la partoj rompas la kontrakton, tiam la tuta kontrakto falas, la alia parto tiam ankaŭ ne estas plu ligita. {Kiel Bismarko demonstris tion al ni tiel bele en la jaro 1866. Do, se vi rompas la regnan konstitucion, tiam la socialdemokrataro estas libera, povas rilate al vi fari aŭ ne fari, kion ĝi volas. Sed tio, kion ĝi tiam faros – tion ĝi hodiaŭ certe ne rakontas.}

Estas nun preskaŭ precize 1.600 jaroj, kiam en la Roma Imperio ankaŭ agadis danĝera renversa partio. Ĝi subfosis la religion kaj ĉiujn bazojn de la ŝtato; ĝi rekte neis, ke la volo de la imperiestro estas la plej alta leĝo, ĝi estis senpatruja, internacia, ĝi etendiĝis tra ĉiuj imperiaj landoj de Gaŭlo ĝis Azio kaj trans la imperiaj limoj. Ĝi estis longan tempon subfosinta kaŝe; sed jam de iom da tempo ĝi konsideris sin sufiĉe forta por aperi malkaŝe. Tiu renverso-partio, konata sub la nomo de kristanoj, estis ankaŭ forte reprezentata en la armeo; tutaj legioj estis kristanaj. Kiam ili estis komanditaj iri al la oferceremonioj de la pagana landa eklezio por tie honori, la renversosoldatoj tiom impertinentis, ke ili metis al siaj kaskoj, en signo de protesto, apartajn signojn – krucojn. Eĉ la kutimaj ĉikanadoj de la superuloj en la kazernoj estis senfruktaj. La imperiestro Diokletiano ne povis pli longe senfare rigardi, kiel ordo, oboe kaj disciplino estis subfosataj. Li energie intervenis, ĉar ankoraŭ estis tempo. Li faris socialistoleĝon –, nu, kristanleĝon. La kunvenoj de la renversuloj estis malpermesataj, iliaj lokaloj fermitaj aŭ detruitaj, la kristanaj insignoj, krucoj ktp estis malpermesataj kiel en Saksujo la ruĝaj naztuko. La kristanoj estis deklaritaj nekapablaj plenumi ŝtatajn oficojn, ili eĉ ne rajtis esti simplaj soldatoj. Ĉar oni tiam ankoraŭ ne disponis pri juĝistoj tiel bone dresitaj pri la „reputacio de la persono”, kiajn la leĝpropono pri

14 2-a versio: al kiu ĝuste nun tiom bone efikas ...

15 En la originalo ankaŭ latine: *regis voluntas suprema lex!* -vl

renversuloj de s-ro von Köller premias, oni simple malpermesis al la kristanoj serĉi sian rajton antaŭ tribunalo. Ankaŭ tiu esceptoleĝo restis senefika. La kristanoj moke deŝiris ĝin de la muroj, kaj ili en Nikomedio laŭdire eĉ fajrigis la palacon super la kapo de la imperiestro. Tiam tiu venĝis sin per la granda kristanpersekuto de la jaro 303 de nia erao. Ĝi estis la lasta de sia speco. Kaj ĝi estis tiom efika, ke dek sep jarojn poste la armeo konsistis plejparte el kristanoj, kaj la sekva memreganto de la tuta romia imperio, Konstanteno, kiun la pastroj nomas la Granda, proklamis la kristanismon ŝtatreligio.

Londono, la 6-an de marto 1895

F. Engelso

La Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) – reta, laŭokaze ankaŭ papera – volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, trarivebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

1. – **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

2. – **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

3. – **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

4. – **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

5. – **GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

6. – **Johano Besada: Eseoj**, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

7. – **[Karlo Markso] Markso hodiaŭ -- Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

8. – **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisneros, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

9. – **Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949**, elfrancisgis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

10. – **Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

11. – **Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

12. – **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

13. – **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-03-8 (2-a eld.: 978-2-918300-21-2)

14. – **Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

15. – **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj. François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spuglo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf Berthold: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono.** Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

18. – Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontribuoj al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psikologio de la krizo, Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobregado – Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

19. – Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo, Howard Zinn: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, **Noam Chomsky:** Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, **William Blum:** La nepardonebla revolucio, **Michael Parenti:** Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, **Piero Glejeses:** Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet:** Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani:** La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass :** La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith:** Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau:** Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith:** Raporto pri du procesoj, **James Petras:** La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma:** Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada:** La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná:** Historio kiun la amas-komunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, **Nadine Gordimer:** La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

20. – Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolando-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

21. – Oktobra Revolucio kaj la sekvoj. Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovet socio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

22. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2, Joachim Bischoff: La financa krizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauer mann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financa krizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

23. – La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj. Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenc-reproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsiĥosocia unuo homo – kognativa cerb esplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

24. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, *Ĉapitroj unua ĝis naŭa*, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

25. Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaŭo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

26. – Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

27. – Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

28. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3 (2010), Werner Seppmann: Riskokapitalismo;, Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon;, Christina Kaendl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomiakrizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

29. – Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo? Eseo elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

30. – Adĵevi ADJE: El togolanda saĝosako, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-20-5

31. – Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

32. – Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3

33. – Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

34. – Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

35. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, *Ĉapitroj deka ĝis dektria*, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

36. – Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseo kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO₂-diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo; raportoj, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN

37. – Georgo Plehanov: Pri rolo de la persono en la historio, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6.

38. – Karlo Markso: Pri la juda demando, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

39. – Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

40. – Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

41. – Jozefo Ŝlejŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4

42. – Ivan Efremov: La Horo de Bovo. Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3

43. – Roger Martelli: La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES, elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p. ISBN 978-2-918300-36-6

44. – Karlo Markso: **Kontribuajo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0

45. – Miriam Rodríguez; ALVERA: **Desegni la parkon**, elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6

46. – Kien Afriko en la 21-a jarcento? *Le Monde diplomatique en Esperanto*, MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7

47. – Paŭlo Popo: **Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0

48. – Ŝteĝervaldo, Roberto: **Komunistaj star- kaj disput-punktoj**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3

49. – Jürgen Albohn: **Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo – Kritiko de la Wertkritik.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7

50. – V. I. Lenin: **Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio.** Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, MAS, 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4

51. – Unuiĝintaj Nacioj: **Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migraj laboristoj kaj de iliaj familianoj.** Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1

52. – Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: **Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo**, komp. Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8

53. – Karlo Markso: **La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4

54. **Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn**, tradukita de Jeanne Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2

55. Miriam Rodríguez: **Profiloj de Suno kaj Luno**, elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, MAS, 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5

56. Frederiko Engelso: **Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-48-9

57. Georgo Dimitrofo: **Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco; kun enkonduko de Günther Judick**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 113 p., ISBN 978-2-918300-49-6

58. José María Arguedas: **Yawar-festo (Sangofesto)**, Esperantigita de Franklin Montenegro, MAS, 2011, 256 p., ISBN 978-2-918300-51-9

59. Ekonomia krizo n-ro 4. Joachim Becker: EU – de la ekonomia al la integriĝa krizo. Jörg Goldberg: La mondo de la du rapidoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-52-6

60. Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj. Werner Seppmann: Privilegia loko por rigardi en la laborejon de la marksisma pensado. Notoj pri la korespondado inter Markso kaj Engelso; Erwin Marquit: Engelso kaj logikaj kontraŭdiroj; Karl Hermann Tjaden: Kial ne estiĝis vera engelsismo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 p., ISBN 978-2-918300-50-2

61. V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo; Anarĥismo kaj socialismo; Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio; La diferencoj en la eŭropa laborista movado; Antaŭparolo al la broŝuro de N. Buĥarin: „Mondekonomio kaj imperiismo”; elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 40 p., ISBN 978-2-918300-53-3

62. Daŭrigo de la Manifesto, Moderna poziciigo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP, kun antaŭparolo de Helmut Dunkhase, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 63 p., ISBN 978-2-918300-54-0

63. Lode Van de Velde: Epizodoj, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-55-7

64. Jasuo HORI: Tertrema katastrofo de Japanio. Taglibro, MAS kaj SAT, 2011, 165 p., ISBN 978-2-918300-56-4

65. Werner Seppmann: La malkonfesata klaso.. Pri la laborista klaso hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 176 p., ISBN 978-2-918300-57-1

66. Roberto Ŝteĝervaldo: Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi – ankaŭ ne; Werner Seppmann: Remalkovro de la klasoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 paĝoj, ISBN 978-2-918300-58-8

67. Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-60-1

68. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-59-5

69. Kien la klimato? N-ro 2, MAS, 2011, 61 p., ISBN 978-2-918300-61-8

70. Berto Breĥto: Historioj pri S-ro Kojno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 43 p., ISBN 978-2-918300-62-5 (ekskluzive kiel materialo por seminario ĉe MAS)

71. Ivan Efremov: Rakontoj pri neordinaraĵoj, tradukitaj el la rusa de Jurij Finkel, MAS, 2011, 604 p., ISBN 978-2-918300-63-2

72. Alfredo Bauer: Kritika historio de la judoj, vol. 1, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 459 p., ISBN 978-2-918300-64-9

73. Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasulić, kun Klaus Gietingter: La miskompreno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 59 p., ISBN 978-2-918300-71-7

74. Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 65 p., ISBN 978-2-918300-65-6

75. Georgo Fulberto: „La kapitalo” koncize. Kun recenzo de Lucas Zeise. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 98 p., ISBN 978-2-918300-72-4

76. Ivan Efremov: Tais el Ateno. El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2012, 533 p., ISBN 978-2-918300-73-1

77. Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, en: Vilhelmo Lutermano: Materialo por la seminario de MAS: „Berto Breĥto kaj klasa moralo en liaj verkoj «Historioj pri S-ro Kojno» kaj «Me-ti, libro de turnoj», Parto 2-a: «Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj»”, MAS, 2012, 147 p., ISBN 978-2-918300-74-8

78. Eddy Raats: Pasio, defio, amikeco. Spertoj de montgrimpisto. MAS, 2012, 95 p., ISBN 978-2-918300-70-0

79. Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo. 2-a eld., MAS, 2012, 99 p., ISBN 978-2-918300-76-2

80. V. I. Lenin: Imperiismo, kiel la plej alta stadio de kapitalismo. (populara eseo) El la rusa tradukis Jurij Finkel. Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 125 p., ISBN 978-2-918300-77-9

81. Yoandry Martínez Rodríguez: Tri en la montaro. Tri infanteatraĵoj kun desegnaĵoj de Adrián Armas González. Elhispanigita de Jozefo de J. Campos Pacheco, MAS, 2012, 54 p., ISBN 978-2-918300-79-3

82. Kien la klimato? N-ro 3 (2012) Pri la roloj de kresko kaj de merkato en la tasko protekti la klimaton, Kvin eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 62 p., ISBN 978-2-918300-80-9

83. Rolfo Lotero: Ĉu evolucio aŭ kreado? Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 22 paĝoj, ISBN 978-2-918300-81-6

84. Hans' Magno Encensbergo: Defendo de la lupoj kontraŭ la ŝafidoj. Poemoj. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 118 p., ISBN 978-2-918300-75-5

85. Domeniko Losurdo: Libereco kiel privilegio. Kontraŭhistorio de la liberalismo. Esperantigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 379 p., ISBN 978-2-918300-82-3

86. Franco Kafka: Letero al la patro. Kun akompanaj tekstoj kaj postparolo de Michael Müller. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. MAS, 2012, 81 p., ISBN 978-2-918300-83-0

87. Aleksandro Grin: Skarlataj veloj. La ora ĉeno. Kuranta sur ondoj. Mallongaj rakontoj. El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2013, 418 p., ISBN 978-2-918300-84-7

88. Lothar Peter: Postmoderna maldekstra radikalismo – ĉu vojo al nova estonteco? Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 25 p., ISBN 978-2-918300-85-4

89. Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe. Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso kaj la Ontologio de la socia esto; Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la ontologio de Lukaĉo. Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 61 p., ISBN 978-2-918300-86-1

90. Roberto Ŝteĝervaldo: Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-87-8

91. Heinz Dieterich: Transiroj al la socialismo en la 21-a jarcento, elgermanigita de

Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 22 p., ISBN 978-2-918300-88-5

92. Frederiko Engelso: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francio 1848 ĝis 1850 (1895), elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 23 p., 2013, ISBN 978-2-918300-89-2 (tiu ĉi libreto)

Frederiko Engelso: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francio
1848 ĝis 1850 (1895)
elgermanigita de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2013
ISBN

Enpaĝigita de MAS per LibreOffice 3.4.3 kaj litertiparo Liberation Serif 10
kaj 9 pt sub Mandriva Linukso 2010

Presita en Germanio en la jaro 2013